


MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16



Pensoj de Ramón y Cajal

Jen kelkaj pensoj de nia glora, mondfama sciencisto aragona pri Hispanlando:

Iu el malfeliĉaĵoj de nia lando estas, kiel oni diris multfoje, ke la privata intereso ignoras la publikan intereson.

Preskaŭ ĉiuj malbonoj de la popoloj kaj individuoj venas, de tio ke ili ne sciis esti energiaj kaj prudentaj en kritika, historia momento ne plu revenonta.

Mi opinias, ke en la treege konata frazo de Hobbes "la homo estas lupu pri la homo" oni kalumnias iom la lupon. Ambaŭ havas mortiginstinkton; sed lupu mortigas por satigi sian malsaton, sed ne por kontentigi superregavidon. Plie la frato lupu, kiel diris Sankta Francisko, ne tiom malnobliĝis, ke ĝi elpensis cinikan teorion por justigi siajn murdojn.

En demokratia ŝtato ĉiuj liberecoj estas netuŝeblaj, esceptinte unu: la neon je la libereco. Kaj ĉiuj laŭlegaj rajtoj ankaŭ, esceptinte: la mens-

difektado je la estontaj civitanoj. Ni respektu, kiel ion sanktegan, la ege valorajn ĝermojn de la raso. Ĉar ili ne estas niaj, sed de Dio.

Tiu, en kies animo ne fortike enradikiĝis kun helaj koloroj la materia kaj spirita bildo de Hispanlando, eble estas bona soldato, sed neniel bona patrioto.

La malriĉeco kaj malklereco ĉiam iras kune. Tial la instruadproblemo de Hispanlando ne estos tute solvata, ĝis kiam malaperos aŭ malpligraviĝos la vilaĝana mizero per terkulturaĵoj kaj samnivelegemaj kaj ĝis kiam la troa loĝantaro de la centra altebenaĵo estos okupata de centraj aŭ apudkonturaj industrioj favorataj de la ŝtato, kiuj liberigos nin el la hontiga dependo de fremdlando.

Eminenta Costa resumis la rimedojn por la reviviĝo de Hispanlando: MANGPROVIZEJO kaj LERNEJO. Ĝuste. Tamen estas necese ne forgesi, kiel rimarkigas trafe Senador, ke MANGPROVIZEJO estas la unua afero.

Esplorado farita de mi ĉe la vilaĝoj (mi vivadis en ili dum junaĝo) pri la etiologio de la malklereco konvinkis min, pri tio ke nur la malriĉaj terkulturistoj devigataj utiligi siajn filojn por kampaj aŭ paŝtistaj laboroj ne zorgas la instruadon je ilia filaro. Pri la filinoj, sufiĉe peniga okupo estas varti siajn pli junajn gefratojn, preskaŭ ĉiam multnombrajn, kaj plenumi dum la foresto de siaj laborpremataj gepatroj la hejmajn laborojn.

Ni konvinkigu; la unua solvotproblemo en Hispanlando estas liveri al la kampularo la necesajn vivrimedojn, por ke ili povu neutiligi la tro fruan laboron de sia idaro.

Ni estu iom pesimistoj, sed per pesimismo analizema kaj komprenema. Ĉiukaze ni ne permesu, ke ĝi iru de nia cerbo ĝis niaj manoj. Nur per laboro atingos nia lando sian plenan floradon. Estas necese batali samtempe en multaj frontoj. Urgas refandi

la Hispanlandon glorplenan, sed nekompletan, neharmonian, kiun ni heredis el niaj patroj.

Ni ĉiuj skulptu kune hispanan Minervon fortan per sia glavo, sed pli forta pro siaj klereco, prospero kaj saĝeco. Estas tasko de artistoj kaj poetoj fari ŝian belegan vizaĝon kaj brodi ŝian riĉegan mantelon; saĝuloj kutimigintaj al ĉiuj disciplinoj formu ŝian spiriton, pretigante ĝin por la komprenado je la naturo laŭ originala interpreto; geniaj inĝenieroj kaj lertaj laboristoj fabriku ŝiajn armilojn, forĝu ŝian ŝildon kaj skulptu siajn blazonojn. Kaj kiam diino Palas de ĉiuj modelita kaj vivigita per miraklo de kolektiva amo, eliros brilradiante el la skulptejoj kaj ne timos la fremdajn rigardojn, ni ne dubu, pri tio ke ŝi estos salutata respektate kaj simpatie. Kaj tiu suno ĉiam lumananta hispanajn landojn, kvankam tre ofte ne niajn animojn, ankoraŭ origos per gloraj ekbriloj la rasan genion.

MALZORGO KAJ AMO

(Daŭrigo)

Ĝis kiam Gravesend (1) estis preterpasita kaj la flankaj lumoj de la ŝipoj penis vidigi la vojon en la densa mallumego, la piloto ne vekigis el sia amrevo. Probable ĉi tiu estus daŭrinta plu, se subita krio de korpremo kaj teruro devenanta de la kajuto kaj distranĉanta la mildan medion ne estus rompinta ĝin.

“Ho! Kio estas tio?” diris la ŝipestro surprizite.

Antaŭ kiam la piloto povis respondi, la ŝipeni-rejo malfermiĝis, kaj mezaĝa virino treege ekscitite aperis sur la ferdekon.

“Fripono! ŝi ekkriis ekscitege sin ĵetante kontraŭ la piloton. “Redonu min tien; redonu min tien!”

“Kio estas ĉio ĉi, Harry?” demandis severe la ŝipestro.

“Li... li... li... proponis al mi veni en la kajuton”, ĝemis Sino. Jansell, kaj dormigis min kaj for... forportis min. Mia edzo min mortigos; mi estas certa. Redonu min tien”.

“Por kio vi volas esti redonata, se oni mortigos vin”, interdiris sentence ŝipano.

“Mi nun komprenas, kion li intencis, dirante, ke mi gajigis la kajuton”, diris Sino. Jansell; “kaj ke li supozis min kaj mian filinon fratinoj. Li ankaŭ diris, ke li volus vidi min ĉiam tie ĉi. Kanajlo!”

“Ĉu vi diris tion?”, demandis furioze la ŝipestro.

“Nu, mi diris”, respondis la malfeliĉa piloto; “sed mi ne supozis, ke ŝi serioze estis kredonta tion”. “Ŝi poste dormiĝis kaj mi tute forgesis ŝin”.

“Kial do, vi mensogis tiel malsaĝe?”, demandis la ŝipestro.

La piloto ne respondis.

“Virino, kiu povus esti via patrino”, diris severe la ŝipestro. “Jen bela afero okazinta en mia ŝipo, eĉ antaŭ la knabo!”

“La diablo forportu la knabon”, diris la piloto jam incitite.

“Redonu min tien”, ĝemis Sino. Jansell; “vi ne scias, kiom multe estas jaluza mia edzo”.

“Li ne okazigos malbonon al vi”, diris afable la ŝipestro; li certe ne jaluzos vin, kiu ja ne estas junulino; almenaŭ, se li havas iom da saĝo. Vi venos kun ni ĝis Boston (2). Mi jam perdis sufiĉe multe da tempo por nun reiri posten.

“Vi devas redoni min tien”, diris Sino. Jansell pasie.

“Mi reiros posten pro neniu”, diris la ŝipestro. “Sed vi restu tute trankvila; vi estos tiel senriske sur mia ŝipo, kiel sur rifo meze de Atlantiko; kaj rilate la piloton li nur deziris ŝerci vin. Ĉu ne, Harry?”

La piloto respondis ion; sed nek Sino. Jansell, nek la ŝipestro, nek la ŝipanoj, kiuj aŭskultis, ĉiuj, atentege, ĝin kaptis, kaj la malfeliĉa viktimo akceptante tion neeviteblan iris apud la ŝipandon kaj rigardadis senkonsole la akvon.

Ĝis la proksima mateno la piloto, kiu ricevis ordonon manĝi ĉe la ŝipa antaŭaĵo, ne vidis ŝin kaj ignorante la fakton, ke ĉiuj ĉesis labori por aŭskulti, iris al ŝi kaj ŝin salutis per “bonan matenon”.

“Harry”, diris la ŝipestro ŝin montrante per rigardo.

“Tre bone”, diris la piloto kompreninte. “Mi devas paroli al vi tute aparte”, komencis li nervekscite, kaj kondukis ŝin sur la ŝipostajojn sek-vate de tri ŝipanoj, kiuj iris tien por purigi la bronzaĵojn kaj aŭskultadis impertinente. La piloto ordonis ilin lasi tiun nenecesan laboron ĝis alia pli taŭga tempo.

Kiam ili estis solaj li ekparolis, kaj per longa kaj nebula rakonto, kiun unue Sino. Jansell konsideris, kiel revoj de lunatiko, konigis al ŝi siajn verajn sentojn.

“Mi ja neniam supozis tion! ŝi diris, kiam li finis. “Neniam! Ĉar vi ne estis vidanta ŝin ĝis hieraŭ”.

“Kompreneble mi redonos vin tien vagonare”, diris la piloto, “kaj mi diros al via edzo, kiel multe bedaŭras tion”.

“Mi devis suspekti ion, kiam vi diris tiujn belajn aferojn al mi”, diris la trankviligita sinjorino. “Nu, vi bezonos rezignacii al via sorto same, kiel la ceteruloj. Ŝi nur scias diri: Ne. Mi klarigos ĉi tiun aferon pli bone, tio ja estas io; sed mi opinias, ke ili mokridos vin.

“Tio ne gravas”, diris la piloto energie. “Vi estas favora al mi, ĉu ne?”

“Sino. Jansell ridis, kaj la piloto, kiu sukcesis pli multe, ol tio, kion li esperis pri la reestaro je amikaj interrilatoj iris plenumi siajn devojn kun gaja koro.

Fine ili alvenis en Boston matenmeze, kaj post, kiam la Juvelo estis bone instalata, li ricevis permeson de la ŝipestro por akompani la belan vojaĝantinon en Londonon.

Malgraŭ tio, ke li uzis laŭpove ĉiujn rimedojn por ŝin distri dum la vagonara veturado, ĉi tiu ekpezis sur lia akompanantino, kaj jam estis sufiĉe vespere, kiam ili iris tra la mallarĝaj stratoj de Limehouse.

“Ni esploru unue, kiel prezentigis la afero”,

(1) Rivera haveno apud la Tamesa marenfluejo, dudek mejlojn de Londono.

(2) Haveno en la Norda Maro, 107 mejlojn malproksima de Londono.

li diris, dum ili proksimiĝis al la kajo irante sin-
garde laŭlonge de la digo.

Aquila estis ankoraŭ kun sia flanko apud la kajo kaj la pilota koro eksaltis, kiam li vidis la kaŭzon je la tuta ĝenado sole sidanta sur la ferdeko. Ŝi stariĝis iom surprize, kiam ŝia patrino zorge supreniris sur la ŝipon kaj, kurinte al ŝi, ŝi kisis ŝin ame kaj ŝin sidigis sur la ŝipenirejan pordon.

“Malfeliĉa patrino”, ŝi diris kareseme. “Kial vi kunportis ĉi tiun lunatikon tien ĉi?”

“Li volis veni”, diris Sino. Jansell. “Silentu! jen venas via patro”.

La mastro de Aquila aperis sur la ferdekon en tiu momento kaj irinte malrapide al la grupo staris severe rigardante ilin. Sub lia rigardo la piloto senspire rakontis la okazintaĵojn, rimarkante kun iom miksitaj sentoj, ke la mieno de lia aŭskultanto sensulkiĝis, dum li parolis.

“Nu, vi estas ja strangulo”, diris la ŝipestro, kiam li finis. “En nur unu tago vi baras la iradon de via ŝipo, forkuras kun mia edzino kaj perdigas al ni unu akvoaltigon. Ĉu vi ĉiam estas tiel?”

“Mi bezonas supozeble iun, kiu zorgos pri mi”, diris la piloto rigardante oblikve al Nancy.

“Nu! ni gastigus vin ĉi tiun nokton”, diris la ŝipestro metinte sian brakon sur la ŝultrojn de sia edzino; “sed vi estas tiel senzorga! Mi eĉ timas, ke vi bruligus la ŝipon aŭ farus ion similan. Kion vi opinias pri tio, karulino?”

“Mi opinias, ke ni devas provi lin unu pluan fojon”, diris lia edzino. Kaj nun mi malsupreniros por serĉi vespermanĝon. Mi ĝin bezonas”.

La maljuna paro iris malsupren kaj tiu juna restis sur la ferdeko. Nancy proksimiĝis al la ŝipprando kaj sin apogis sur ĝin; kaj ĉar laŭŝajne ŝi estis tute forgesinta lian ĉeeston, la piloto post iom da hezito iris apud ŝin.

“Ĉu ne estas pli bone al vi malsupreniri kaj vespermanĝi?”, ŝi demandis.

“Mi preferus resti tie ĉi, se tio ne vin ĝenas”, diris la piloto. “Min plaĉas rigardadi, kiel la lumoj balanciĝas supren kaj malsupren. Mi restus ĉi tie tutajn horojn”.

“Do, mi bezonas lasi vin”, diris la junulino. “Mi malsatas”.

Kaj ŝi foriris rapide kun malbone kaŝata rido, lasante kvazaŭ trapikita la malfeliĉulon, kiu rigardis indigne la lumojn tiel lin allogintajn por lia malbono.

De malsupre li aŭdis gajan telerbruon akompanatan de apetitigaodoro, babilado kaj ridoj. Li imagis, kiel la junulino lin mokis pro liaj sentimentalaj rezonoj por resti sur la ferdeko; sed, ĉar li estis tro fiero por elporti ŝian ironian rigardon, persistis stari tie decidinte foriri en la unua matena vagonaro.

Li estis liberigata el tiel malgajaj pensoj per tuŝeto sur lian brakon, kaj turniĝinte rapide vidis la junulinon apud si.

“La vespermanĝo estas tute preta”, ŝi diris sobre. “Kaj, se vi bezonas plu admiri la lumojn, supreniru kaj rigardu ilin, kiam mi faras tion... post la vespermanĝo.”

Tradukis el la angla,

RAMON DE SALAS.

Oficialaj sciigoj de la Akademio

(N.º 5.—Oktobero 1934)

1.—Pro sia elekto kiel prezidanto de U. E. A., *Sro. Generalo Bastien* rezignis pri la ofico de direktoro de la Sekcio “Komuna Vortaro”. *Sro. W. Bailey* estas elektita de la Akademio por anstataŭi lin.

2.—La Akademio elektis korespondantino *Fraŭlinon Lidja Zamenhof*, kaj korespondantojn *Sron. Inĝenieron Dron. Orengo*, direktoron de la Sekcio “Teknikaj Vortaroj”, kaj *Sron. R. Kreuz*, direktoron de U. E. A.

3.—*La Kongreso de Stokholmo*, laŭ propono de la prezidanto de L. K., unuvoĉe esprimis la deziron, ke la naciaj asocioj klopodu por prezenti, kiel reprezentantojn de sia nacia lingvo en la L. K., la plej kompetentajn, kaj fidelajn al la Fundamento, el siaj samnaciuloj; ke la eldonistoj de periodaĵoj sendu unu ekzempleron de ĉiu numero al la Prezidanto de la L. K. kaj al la direktoro de la Sekcio de Kontrolo; ke la Akademio ricevu subvencion almenaŭ egalan al tiu, kiun ĝi ricevis de I. C. K. antaŭ la reorganizo de U. E. A. (Laŭ tiu-ĉi deziresprimo, la nova komitato de U. E. A. decidis daŭrigi la subvencion al la Akademio).

4.—Dum la Kongreso de Stokholmo okazis *kunvido de la L. K. Ĉeestis Sroj. Generalo Bastien, Bonnevie, Dro. Couteaux, S-ino. Dresen, Sroj. Inĝ. Isbrücker, Jung, Lundgren, Prof. Dro. Migliorini, Nylén, Dro. Orengo, Rausseau, Setälä, Dro. Szilágyi. Prezidis Sro. Nylén, vicprezidanto de la L. K.; protokolis Prof. Dro. Migliorini, vicprezidanto de la L. K. Estis aprobita prezentado de la deziresprimoj al la kongreso; estis pridiskutitaj la periodeco de la aldonoj al la Universala Vortaro, kaj la Teknikaj Vortaroj.*

5.—*La Sekcio de Kontrolo* klopodis por trovi kunlaborantojn, turnante sin al la recenzistoj de la esperantistaj gazetoj, sed ne multe sukcesis.—Ĝi starigis *normajn lingvajn diplomojn*, kies celo estas determini relativan valoron de la lingvaj diplomoj disdonitaj de la naciaj asocioj aŭ institucioj. Tiu-ĉi valoroj estos publikigitaj en la jarlibro por 1935.

6.—*La jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio por 1934* aperis. Ĝi entenas la liston de la L. K.-anoj, aranĝitan laŭ nacioj. Al la nomo de ĉiu L. K.-ano estas kunigitaj la datoj de lia naskiĝo, de lia esperantistiĝo, de lia elekto al la L. K., kaj eventuale de lia elekto al la Akademio. Por ricevi tiun-ĉi jarlibron sin turnu al la *Centra Esperantista Librejo* (II, Rue de Sèvres, Paris); prezo: 2 Fr. Frk.

La Prezidanto

M. ROLLET DE L'ISLE.

A V I Z O

Oni rememorigas la hispanan samideanaron, ke la 31-an de decembro finiĝos la tempolimo por akcepti la verkojn konkurantajn en la literatura konkurso anoncita en la septembra numero de NIA VIVO. Partoprenu ĝin amase, gesamideanoj! Plivigliĝu nian lingvon per viaj laboraĵoj! Belaj kaj valoraj premioj vin atendas!

Alvoko al la Hispana Esperantistaro

Ni ricevas multe da leteroj demandantaj, ĉu ni havas vortarojn de Sro. Inglada kaj kiam aperos tiu de li pretigita, ĉar nuntempe la hispana esperantistaro havas neniun sufiĉe ampleksan, kiu taŭgas por rekomencantoj. Tio ĉi estas ja bedaŭrinda afero sufiĉe malhelpanta la disvastigon de nia help-lingvo.

En pluraj kongresoj la hispana esperantistaro petis al Sro Inglada, ke li preparu novajn kaj ampleksajn vortarojn por plenigi la menciitan mankon. Nia eminenta samideano plenumis la taskon, laborante multajn monatojn por tiu peza verko. Li do kompletis niajn dezirojn, metante por tio sian inteligenton kaj laboregon.

Tamen, kvankam el oficialaj sferoj eliris por la hispana esperantismo multaj miloj da pesetoj, nek eĉ unu centimo estis uzata por tiu celo, kiu estas nepra neceso, multfoje esprimita deziro de la samideanaro kaj neforgesebla kaj eĉ laŭleĝa devo.

Frateco kaj kelkaj aliaj laŭpove metis monon je la dispono de Sro Inglada por tiu celo. Sed ilia nombro ne estas ankoraŭ sufiĉa por atingi la monsumon necesan por la eldono. Ni alvokas sekve la hispanan esperantistaron, por ke ĝi partoprenu per monprunto la publikigon je tiu necesega verko, kiu, se ĝi volas, aperos tre baldaŭ. Tiu ĉi monofero, neniel perdita, helpos la plej gravan paŝon por la firmigo je Esperanto en nia lando.

ANEKDOTOJ

MIAJ PARIZANINOJ

—Vere, karega Sinjorino, via filino Magdalena fariĝas ĉarmoriĉa. Mi ne dubas, ke la aspirantoj tute ne mankos al ŝi.

—Sensencaĵo, mia karulino; mi estas ankoraŭ tro juna por ke mi povu edzinigi ŝin.

CIMPULVORO

—Sinjor' Doktoro, diris iam naiva kamparano al sia kuracisto, bonvolu helpi al mi, ĉar la litcimoj min manĝegas.

—Atendu, respondis la kuracisto, kiu estis samtempe apotekisto, jen estas skatoleto da pulvoro, kiu kredeble vin liberigos.

La sekvantan tagon alkuris al li spiregante kaj ploregante la edzino de la kamparano.

—Rapidu, Sinjor' Doktoro, mia malfeliĉa edzo mortigis, tordiĝas kvazaŭ li portus la diablon en la ventro. Vi sendube venenis lin per via malbeninda pulvoro kaj tamen *li englutis nur la duonon de la skatoleto.*

Verkis,

G. PHILIPPETE.

P E T O

Ni petas al ĉiuj personoj kaj societoj dezirantaj sendi urĝajn sciigojn, avizojn k. t. p. por ilia publikigo en NIA VIVO, ke ili bonvolu fari la alsendon pli frue, ol la 20-an de ĉiu monato, por la akurata apero de la bulteno.

SCIIGOJ

Nia kara, Honora Prezidanto, la eminenta advokato de nia urbo Sro. Manuel Maynar Barnolas estis antaŭ nelonge nomata urbokonsilanto de Zaragozo.

NIA VIVO tutkore gratulas lin pro tio, kion ĝi havas je persona sukceso, samtempe dezirante al li trafplenan kaj feliĉan agadon en tiu publika posteno.

Ĉiuj radiostacioj de Ĉeĥoslovakujo dissendas la unuan merkredon de ĉiu monato 45 minutojn da paroladoj, kantoj kaj radioteatraĵoj en esperanto.

En nia lando la plej bone aŭdata radiostacio estas tiu de Praga (470 metroj, 120 kilovatoj), kaj la ekzakta horo en Hispanlando estas la 9-15 vespere.

Proprasperte ni rekomendas ĝian aŭdadon pro la intereso kaj aŭdebleco de ĝiaj bonegaj radiosendaĵoj.

Ĉu vi volas feliĉa esti en la edzeco? Se jes, ne-prokraste mendu

“EDZECAN VIVON”

libreton por personoj nur pli aĝaj de 16 jaroj. Prezo: 2 respondkuponoj afrankite. Adreso: Stjepan Mišak, Esperanto eldonejo, ADANA (Turkujo).

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

La 5-an de novembro komenciĝis la elementa kurso kun multenombra ĉeestantaro, inter ili, kelkaj fraŭlinoj. Ĝi estas gvidata de la samideano Eduardo Larrouy, kaj ĝi okazas ĉiulunde, merkredoj kaj vendrede je la 8-a ĝis la 9-a.

La 8-an de ĉi tiu monato ankaŭ komenciĝis la supera kurso, kiun dum la jaŭdoj klarigas la klera samideano Teodoro Elizondo.

Post kelkaj klopodoj ni atingis la organizon de serio da lekcioj pere de la ĉitea Radio-Studio, kiuj okazis la unuan fojon, la 30-an de oktobro kaj poste, la 13-an de novembro.

Ili estis farataj de nia samideano Alberto Diaz (Prezidanto de la Grupo) kaj daŭrigos ĉiudusemajnan mardon.

AVISO IMPORTANTE

LOTERÍA

No habiendo sido posible complacer todas las peticiones recibidas, la directiva de Frateco ha practicado gestiones para averiguar dónde podía conseguir más lotería del número 24.340, del que adquirió las dos mil pesetas enviadas a esta capital. Dichas gestiones van por buen camino y seguramente cuando se publiquen estas líneas, los samideanos podrán satisfacer sus deseos de adquirir más; deseos muy explicables, ya que han sido cinco veces las que Frateco ha alcanzado premio.

Pídanla, pues, enseguida.